Sen io nenio.  
Pro limoj kaj baroj malpacas najbaroj.  
Plenmanon etendu, ne dankon atendu.  
Kio sin kreas, tio pereas.  
Aŭskultu konsilon, vi havos helpilon.  
La tempo pasas, konsilon lasas.  
Gardu amon kun fervor', ke ne velku via kor'.  
En la vivbatal' ne pravas, kiu forton havas.  
Korekto de eraro estas progressa faro.  
En silento la prudento.  
Lup' ŝanĝas harojn, sed ne la farojn.  
Post ĉiu Li sin kaŝas Ŝi.  
Neniu plaĉas al ĉiu.  
Kiom da brustoj, tiom da gustoj.  
Neni' al vi venas, se vi mem ne penas.

Obvestila in vabila

Informoj kaj invitoj

### Mira Lipičar 1927 – 2026

La 30-an de januaro 2026 ni adiaŭis de nia honora anino Mira Lipičar ĉe la tombejo Žale en Ljubljano. Ŝia 99-jara vivo estis plena da severaj spertoj, aparte dum la dua mondmilito. Kiel esperantistino ŝi agadis kun kaj por fervojistoj, ŝi establis du fortajn E-societojn en Ljubljano kaj Mariboro.

Bonvolu ĉi sube legi la funebran paroladon de la estraranino de SIEL Nika Rožej, prezidantino de ES Ljubljana.



Spoštovani žalni zbor!

Tudi esperantisti Slovenije se poslavljamo od sodelavke in prijateljice Mire Lipičar.

Rodila se je 15. 2. 1927 v Mariboru, kjer se je tudi prvič srečala z esperantom. Po preselitvi v Ljubljano je kot pravnica do upokojitve delala pri Slovenskih železnicah.

V Ljubljani se je kmalu povezala z esperantisti in nato leta 1955 s pomočjo dr. Petra Zlatnarja ustanovila Železničarsko esperantsko društvo Ljubljana ter pozneje Železničarsko esperantsko društvo Maribor. Železničarji esperantisti so bili v mednarodnem gibanju za esperanto več desetletij najmočnejša strokovna organizacija. Znano geslo »Železnica povezuje dežele, esperanto narode« so takrat izjemno uspešno uresničevali. Povezani so bili tako strokovno kot v s prireditvami v jugoslovanskem in mednarodnem prostoru. Tudi v Sloveniji sta obe železničarski društvi, skupaj s takratno Zvezo esperantistov Slovenije, Železničarsko šolo ter Železniškim gospodarstvom Slovenije uresničili vrsto odmevnih dogodkov, med drugim tudi 23. kongres svetovnega združenja železničarjev leta 1971 v Mariboru s preko 600 udeleženci.

Mira je uredila in izdala učbenik Esperanto za železničarje (1955) po učbeniku A. Sekereša, brošuro o gibanju za esperanto na železnici ob Kongresu IFEF leta 1971, prevedla in izdala učbenik Mednarodni jezik esperanto: za železničarje Gvozdena Sredića (1985), pripravila prevode več strokovnih člankov za kongrese in mednarodna srečanja ter objavila vrsto člankov in prispevkov v železničarskih revijah.

Mira Lipičar je bila več let predsednica Železničarskega društva Ljubljana in tudi predsednica Zveze esperantistov Slovenije. Delovala je v odborih Jugoslovanske zveze esperantistov, Jugoslovanske zveze železničarjev esperantistov in Mednarodne federacije železničarjev esperantistov (IFEF) ter bila delegat A iz Slovenije v Svetovnem esperantskem združenju (UEA). Več let je kasneje tudi delovala v vodstvu esperantskega društva Koper. Bila je z nami, dokler so ji to dopuščale moči.

Za svoje vsestransko in neumorno delo je leta 1982 prejela državno odlikovanje »Red republike z bronastim vencem«, v Združenju za esperanto Slovenije pa smo jo imenovali za častno članico.

Kara amikino kaj samideanino Mira! Koran dankon pro via longjara, sindona kaj fruktodona laboro por nia Esperanto-movado. Ni memoros vin kun dankemo kaj estimo. Ripozu trankvile!

V imenu esperantskih društev ter Združenja za esperanto Slovenije izrekamo iskreno sožalje hčerki Tatjani ter ostalim sorodnikom!

## 111-a UK GRAZ 2026

Ĝis la fino de marto 2026 aliĝis 14 personoj el Slovenujo. Aperis la dua kongresa bulteno kun detalaj informoj pri la loĝado kaj ekskursoj. La programo ankoraŭ estas provizora.

Izšel je drugi kongresni bilten s kopico podatkov o mestu Gradec, o možnostih nastanitve, potovanjih, ogledih itd. Standardno lepa brošura na 58 straneh je v PDF verziji brezplačno na razpolago na spletišču UEA s povezavo <https://uea.org/kongresoj>. Program kongresa je začasen, možne so še manjše spremembe. Kongresna tema 111. svetovnega esperantskega



kongresa je “Prostovoljstvo v službi trajnostnega razvoja”. Navezuje se na mednarodno leto prostovoljcev za trajnostni razvoj, kot ga je za leto 2026 razglasila OZN. V programu kongresa so predvideni tudi pisni in ustni izpiti KER za nivoje B1, B2, C1 in C2. V načrtu izletov sta med drugimi obisk Maribora ter večdnevno porotvanje po Sloveniji in avstrijski Koroški. Iz seznama prijavljenih pa je razvidno, da se je iz Slovenije doslej prijavilo 14 oseb, vsega skupaj pa doslej 915 oseb iz 58 držav..  
**O.K.**

## Oni kongresas!



La 27-an de januaro 2026, je la 21-a horo laŭ loka tempo, la Itala Esperanto-Federacio (IEF) organizis per la aplikaĵo Zoom prelegon pri la plej gravaj Esperantaj kongresoj en 2026. Virtuale partoprenis 54 personoj precipe el Eŭropo.

Laura Brazzabeni de FEI prezentis la 92-an italan kongreson en Vico del Gargano (Apulia) de la 22-a ĝis la 29-a de aŭgusto. Kongresa temo: »Esperanto – lingvo de paco kaj de defendo de identecoj.«

La Itala Esperanto Junularo (IEJ) festivalos en Cervia (Emilia-Romagna) de la 1-a ĝis la 7-a de aprilo. Parolis Gabriele.

Dorota prezentis nome de UEA la 111-an UK-on en Graz.

Luigia Oberrauch prezentis la 59-an kongreson de ILEI en Zao-Zhuang en Ĉinujo de la 10-a ĝis la 16-a julio. Kongresa temo: »Eduki profesiajn esperantistojn«.

Albert de TEJO prezentis la 82-an IJK en Tiana (Barcelono) de la 9-a ĝis la 16 de aŭgusto.

En Hispanujo okazos du gravaj eventoj: Averta. Bonvolu

- La 84-a Hispana kongreso en Portugalete (Bilbao) de la 14-a ĝis la 18-a de julio kaj
- La 99-a SAT-Kongreso en Leon de la 19-a ĝis la 26. de julio.

Averta: Bonvolu atenti pri la novaj informoj kaj ŝanĝoj de tiuj kongresoj en la retejo Eventa Servo. **O.K.**

## Eŭropa himno en la slovena ĉe Jutubo

En la retejo Jutubo (angle Youtube) oni povas nun aŭskulti kaj spekti la unuan kantatan prezenton de la eŭropa himno *Odo al ĝojo* kun la teksto de Umberto Brocatelli, slovenigita de Tomaž Longyka. La videoregistraĵo de Andrej Žumer Skribas estiĝis dum la Zamenhof-Tagofesto en Ljubljano, la 13-an de decembro 2025. En la aldonita klariga teksto oni trovas la esperantan kaj la slovenan tekston de la kanto. Oni serĉu la registraĵon per la kapvortoj *Zamenhofov dan*. Jen la rekta ligilo <https://www.youtube.com/watch?v=qEu-Q5BnPmQ>.

Krome, se vi jam retumas, bonvolu viziti alian videoregistraĵon de Andrej Skribas kun Dragica Ropret Žumer (ambaŭ estas geanoj de ES Ljubljana), kiu per kamiŝbajo prezentas esperantigitan poemon de France Prešeren *Nezakonska mati* (Needzeca patrino). Tiu ĉi

registraĵo estiĝis en la postkvarantena jaro 2021 en la salono de la Urba biblioteko Kranj. La ligilo: <https://www.youtube.com/watch?v=LVJvul4-tAg>. **O.K.**

## Jarkotizoj de SIEL kaj ESL

Prosimo vse ĉlane naŝih organizacij, da poravnajo zapadle ĉlanarine, ker tako omogoĉijo naŝe redno delovanje ter tudi izkaĝejo svojo podpore in interes za esperantsko gibanje. Ĉe ne veste, koliko ste v zaostanku s plaĉilom, nas vpraŝajte na elektronski poŝtni naslov: [info@esperanto.si](mailto:info@esperanto.si).

Letna ĉlanarina za leto 2026 **Zdruĝenja za esperanto Slovenije** (ZES) za individualne ĉlane je 20 € za zaposlene, 10 € za ŝtudente, upokojence in brezposelne ter 0 € za mlade do 18. leta. Ĉlanarino ali prostovoljne prispjevke lahko plaĉate na sreĉanjih in sestankih ali na poslovni raĉun ZES pri Delavski hranilnici d. d. Ljubljana ŝt. SI56-6100-0001-2538-761 z obrazcem UPN. Kot kodo namena vpiŝete »char« in namen plaĉila: »priimek, ĉlanarina in ustrezno leto oz. obdobje«. Pri referenci prejemnika vpiŝete kodo SI99, ostalo pa pustite prazno.

Letna ĉlanarina za leto 2026 **Esperantskega druŝtva Ljubljana** (EDL) je na ravni ZES, to je 20 € za zaposlene, 10 € pa za brezposelne, upokojence in ŝtudente. Ĉlanarino ali prostovoljne prispjevke lahko plaĉate na sreĉanjih in sestankih ali na poslovni raĉun EDL pri Delavski hranilnici d. d. Ljubljana ŝt. SI56-6100-0000-1703-764. Glejte ŝe navodilo za izpolnitev obrazca v zgornjem odstavku. **O.K.**

## Kion oni legos en la sekvonta numero?

Por la sekvonta numero de *Informacije / Informoj*, kiu aperos en julio 2026, ni antaŭvidas raportojn pri la aranĝoj en Esperantujo ĝis la fino de junio 2026, kunvenoj ktp. Krome el nia agado:

- artikolo pri la bulteno *Informacije / Informoj*
- venontaj kursoj de Esperanto
- Eŭropa kongreso de Esperanto en 2027
- katalogo de la arĥivo de SIEL
- ktp.

La redaktoro rekomendas sin por kontribuoj pri viaj agado, proponoj, komentarioj, fotoj kaj rimarkoj, kiuj povus interesi la legantaron. Aparte estas bonvenaj verkoj en Esperanto, ĉar ni ĉiuj bezonas ekzerciĝon kiel aŭtoroj kaj legantoj. **O.K.**

**INFORMACIJE / INFORMOJ** izdaja / eldonas Zdruĝenje za esperanto Slovenije / Slovenia Esperanto-Ligo, Grabloviĉeva 28, SI-1000 Ljubljana, Slovenija / Slovenujo.  
<http://www.esperanto.si>. Matična ŝt. / kodnumero 1205226. ID za DDV / n-ro por AVI: 93737777.  
Poslovni raĉun / bankkonto: IBAN SI56 6100 0001 2538 761 pri / ĉe Delavska hranilnica d. d..  
(Swift-kodo: HDELSI22). Uredil / redaktis Ostoj Kristan, lektoriral / kontrollegis Tomaĝ Longyka.  
**ISSN 2385-9628** URL: <http://www.esperanto.si/eo/bulteno-informacije-informoj-0>

Tibor Sekelj (1912 – 1988)

## Miaj kunvojaĝantoj

La suno brilis kaj la aŭtovojo estis larĝa.

Mia aŭtomobilo gaje kaj senbrue rulis inter montoj kaj valoj. Mi deziris vojaĝi tre malproksimen. Kaj kial ne? Mi estis certa ke nenio povos haltigi min ĝis la fino de la mondo.

Kiam mi alvenis al iu urbo aŭ vilaĝo, mi manĝis en restoracio. Kaj mi ne forgesis pri mia bona amiko, la aŭtomobilo. Al ĝi mi donis multe da benzino por trinki, kiam ajn mi alvenis al iu benzinpumpo. Por bone funkcii, ĝi bezonis ankaŭ oleon kaj multe da akvo. Ĉion mi donadis al ĝi.

Ĉiuj admiris mian aŭtomobilon sur la vojo, tiel gaje kaj rapide ĝi veturis.

Super grandaj pontoj ni pasis, kaj foje eĉ kun vagonaro ni vetkuris.

Mi estis vere feliĉa.

Ni transiris la landlimon, kaj eniris en alian landon. Mi vidis strangajn pejzaĝojn, pri kiaj neniam antaŭe mi eĉ songis.

Ni alvenis al bela urbo. Altaj kaj sveltaj turoj kaj multaj kupoloj ornamis ĝin. Kaj vespere la arĝenta luno brilis super ĝi.

La vojo fariĝis iom malpli larĝa, kaj la benzinpumpoj ĉiam malpli ofte estis troveblaj apud la vojo. Ankaŭ arbojn mi ne plu vidis. Nur sablaj montetoj ĉirkaŭis nin. Nenie rivero nek puto.

Ni troviĝis en dezerto.

Subite la aŭtomobilo haltis. Mi premis ĉiujn ĝiajn butonojn unu post la alia, sed ĝi rifuzis denove ekmoviĝi. Mankis al ĝi benzino kaj akvo, kaj mi ne povis tion doni al ĝi. Akvo kaj benzino ne estis troveblaj en la dezerto.

Tre malgaja mi estis. Mi eksidis sur la sabla vojo apud la aŭtomobilo, kaj ne sciis kion fari. Tute sola mi estis en la granda dezerto. Mia nura penso estis, kiel eliri el ĝi. Sed nenia ideo venis al mi.

Jam tre longe mi sidis tiel, kiam mi ekvidis punkton sur la horizonto. Ĝi moviĝis. Kiam ĝi alproksimiĝis, mi vidis ke ĝi estis homo gvidanta dromedaron. Ili venis ĉiam pli kaj pli proksimen.

La homo salutis min, kaj diris ke lia nomo estas Hasan.

– Kial vi estas tiel malgaja, amiko, demandis Hasan.

– Kiel mi ne estu malgaja, ĉu vi ne vidas kio okazis al mi? Mi havas belan aŭtomobilon, sed mi ne povas daŭrigi la vojaĝon, ĉar mi trovas nek benzinon nek akvon por ĝi.

– Ho, mi komprenas vian ĉagrenon. Sed tion vi ja povis antaŭvidi. Neniu saĝa homo veturas per aŭtomobilo tra dezerto.

– Per kio mi, do, vojaĝu, Hasan?

– Rigardu, amiko, mian dromedaron. Ĝi estas la sola veturilo kapabla transiri sen malfacilaĵoj ĉiujn dezertojn de la mondo. Ĝi ne bezonas benzinon. Akvon ĝi trinkas, jes, sed nur kiam ĝi alvenas al puto. Unu sola trinko sufiĉas al ĝi por transiri la plej grandan dezerton.

– Vere miriga besto ĝi estas! – mi ekkriis. Kiel mi ŝatus havi tian dromedaron! Sed kie akiri ĝin?



– Nu amiko, ĉar vi troviĝas en tia embaraso, mi ŝatus helpi vin. Mi donacos al vi mian dromedaron, kaj daŭrigu la vojaĝon.

– Ĉu vere vi faros tion, Hasan? Ho kiel bonkora vi estas! Sed per kio mi repagos al vi tiun grandan komplezon?

– Ne zorgu, ne zorgu, amiko. Ne necesas pagi ion. Nu, lasu al mi tiun ĉi vian ladskatolon, – li diris montrante al mia aŭtomobilo.

– Tre volonte. Mi ne plu bezonas ĝin nun, kiam mi havas vian bravan dromedaron.

Hasan ordonis al la besto eksidi sur la teron por ke mi surgrimpu sur ĝian dorson. Kun mi sur la selo la dromedaro poste leviĝis, laŭ alia ordono de Hasan.

Unue ĝi ekstaris sur siajn malantaŭajn piedojn. Tiam ĝi skuiĝis tiel forte, ke mi preskaŭ falis antaŭen super ĝia kapo. Tuj poste ĝi ekstaris ankaŭ sur la antaŭajn piedojn, kaj preskaŭ jetis min sur la dorson. Sed feliĉe mi firme tenis la selon sur kiu mi sidis.

Hasan eldiris novan ordonon. La perfekta veturilo de la dezertoj ekmarŝis.

La bonkora Hasan restis staranta apud la aŭtomobilo. Mi mansvingis al li adiaŭe.

Dromi – kiel mi nomis mian novan amikon - marŝis malrapide.

Kiel ĝi moviĝis, ĝi skuis min antaŭen kaj malantaŭen. Tio estis iom nekomforta vojaĝmaniero. Sed mi sentis min feliĉa. Imagu: nek manko de benzino nek manko de akvo povos haltigi nin ĝis la fino de la mondo!

Kaj desur la ĝibo de Dromi mi vidis ĉion de supre. Mia horizonto pligrandiĝis. Mi sentis min fieraj kaj senzorga. Kvazaŭ la tuta dezerto estus mia.

La horoj pasis rapide. La suno komencis subiri kaj la ĉielo koloriĝis per belegaj koloroj.

Ni alvenis al vilaĝo.

– Ĉi tie mi dormos, mi pensis.

– Haltu, Dromi! mi ordonis.

Sed Dromi tion ne komprenis. Mi devus eldiri la saman vorton, kiun Hasan kutimis diri en tiaj kazoj. Sed tiun vorton mi ne konis.

Kiam mi forte ektiris la bridon kun la intenco haltigi ĝin, anstataŭ halti, Dromi eĉ pli vigle ektrotis tra la vilaĝo. Eĉ la lasta domo restis malantaŭ nia dorso, kaj ni daŭrigis la veturadon.

La nokto estis malvarma kaj malhela. Nur la steloj brilis sur la ĉielo. Kaj ni trotis antaŭen tra la dezerta pejzaĝo. Kiel varma estis la tago, tiel frosta fariĝis la dezerto tuj post la sunsubiro. Miaj dentoj kunfrapadis pro frostotremo.


La konstanta skuado estis tre laciga. Mi ŝatus dormi, sed tio estis neebla sur la moviĝanta dorso de Dromi.

Fine komencis tagiĝi. La ĉielo fariĝis ruĝa, sed mi ne povis ĝui ĝian belecon, ĉar mi estis tro laca.

Kian la suno leviĝis, Dromi haltis. Ĝi eksidis meze de la vojo.

Ne, tie mi ne volis halti. Nun mi deziris daŭrigi la vojaĝon ĝis la proksima vilaĝo, kie mi povos ripozi. Mi provis tion klarigi al Dromi unue per belaj vortoj kaj petoj, poste per tiroj de la brido, kaj eĉ per kelkaj kalkanfrapoj. Sed ĉio estis vana. Ĝi decidis tie resti, kaj estis neeble ekmovi ĝin.

Mi eksidis apud la vojo seniluziiĝinta kaj senespera. Mi konkludis, ke mi ne povos daŭrigi mian vojaĝon laŭ tiu maniero.



Dum mi tiel sidis, kun la vizaĝo inter la manoj, iu frapis mian ŝultron. Mi turnis min. Tie staris junulo tenante azenon per ŝnuro. Li interesiĝis pri la kaŭzo de mia malgaja aspekto. Kiam mi finrakontis mian malgajan historion, li diris per tre amika voĉo:

– Kompreneble, se vi ne scias la lingvon de la dromedaroj, vi ne povas estri la dromedaron. Vi estas devigata sekvi ĝiajn kapricojn.

Post momento li kompate frapis mian ŝultron kaj daŭrigis:

– Se vi havus azenon kia estas la mia, ĝi portus vin same bone kiel la dromedaro. Sed ĝi estas tiel malalta, ke vi povus ekrajdi sur ĝin, aŭ malsupreniri en kiu ajn momento, eĉ sen antaŭa averto.

Kun envio mi ekrigardis la bravan azeneton. Ĝi havis tre simpatian kaj kvietan aspekton.

– Ho jes, se mi havus tian...! - mi sopiris.

– Ne malgaju plu, amiko, – diris la junulo. – Mi pretas helpi vin. Mi donacas al vi mian azeneton, kvankam mi bedaŭras disiĝi de mia kara vojaĝkamarado.

Post nelonge mi jam gaje kaj dankeme rajdis sur la azeneto. Turnante min, mi vidis mian bonfaranton ekrajdi sur la dorson de Dromi. Li bone konis la vortojn necesajn por ĝin eksidigi kaj ekstarigi.

Mi estis tre kontenta per mia nova veturilo. Ĝi estis ĝuste tio, kion mi bezonis. Per malgrandaj sed rapidaj paŝetoj ĝi trotis tra vilaĝoj kaj dezertaj sablaj vojoj.

Alveninte al iu vilaĝo, kutime ni ambaŭ manĝis. Vespere ni tie dormis kaj gaje daŭrigis la vojon matene.

Sed baldaŭ ni eniris pli profunden en la dezerton, kaj tie komenciĝis la malfacilaĵoj. Dum la tuta tago ni ne plu trovis eĉ unu vilaĝon. Kiam ajn mi manĝis, mi devis la

duonon de mia manĝaĵo doni al la kompatinda azeneto: peco da pano al mi, peco al ĝi. Peco da fromaĝo al mi, peco al ĝi. Ankaŭ la akvon, kiun mi portis en boteleto, mi dividis kun mia kunvojaĝanto: kelkajn glutojn mi, kaj la reston ĝi. Terure multe da akvo trinkas eĉ la plej malgranda azeneto!

La sekvantan tagon ni ambaŭ estis malsataj, kaj tre soifaj.

Jam ni estis tute elĉerpitaj kiam ni atingis dometon. La dommastrino afable akceptis nin. Tuj ŝi donis al mi glason da lakto, kaj al mia azeneto sitelon da freŝa akvo.

Ho, kiel bongusta estis tiu lakto! La duan kaj la trian glason mi ankaŭ kun ĝuo eltrinkis.

Antaŭ ol mi forlasis la domon, sinjorino Lakŝmi – tiu estis la nomo de la dommastrino – avertis min pri la danĝero vojaĝi en tiu regiono sen sufiĉa manĝaĵo kaj trinkaĵo.

– En tiu ĉi regiono, – ŝi diris – estas pli grave havi kun vi sufiĉe da trinkaĵo, ol veturi konforte.

Ŝi frapis sian frunton kaj ekkriis:

– Mi havas ideon!

Vere ŝia ideo estis tre saĝa.

Kiam mi daŭrigis mian vojaĝon, mi ne rajdis sur la azeneto. Ĝi restis ĉe sinjorino Lakŝmi. Sed anstataŭ ĝi mi gvidis per ŝnuro belegan blankan kaprinon. La saman kies bongustan lakton mi trinkis ĉe la alveno.

Kaj nun la vivo fariĝis vere bela. Kiam mi eksoifis, mi eĉ ne pensis pri akvo. Nur mi eksidis apud la kaprino, melkis el ĝi glason da freŝa lakto, kaj trinkis ĝin kun ĝuo.

Dum multaj tagoj tiel ni marŝis, kaj ŝajnis ke la amikeco inter la kaprino kaj mi neniam ĉesos.



Sed iun nokton, dum ni dormis en arbareto apud la vojo, mi aŭdis blekojn de iu sovaĝbesto el la malproksimo.

Tigroj alproksimiĝis. Ili volis manĝi mian kaprion. Rapide mi ekbruligis fajron por timigi la sovaĝbestojn, sed ili tamen atakadis dum la tuta nokto. Apenaŭ mi sukcesis defendi min kaj mian kunvojaĝanton per batoj de longa bastono.

Matene, kiam la tigroj foriris, mi estis tiel laca, ke tuj mi ekdormis.

La sekvantan nokton iuj ŝtelistoj volis forŝteli la kaprion. Mi devis ĝin gardi la tutan nokton.

Iun tagon ankaŭ malsataj hundoj atakis mian kaprion. Mi jam ne plu dormis trankvile. Ĉiun momenton mi vekigadis por vidi ĉu iu ne forŝtelis mian kunvojaĝanton.

Post kelkaj sendormaj noktoj mi komencis senti min laca kaj malforta. Pro tio mi estis feliĉa, kiam mia nova amiko, sinjoro U Ba-tan invitis min dormi en lia hejmo. Li havis bonan hundon kiu gardis la domon. Mi dormis tute trankvile kaj havis belajn songojn.

Matene, kiam mi parolis al sinjoro U Ba-tan pri miaj zorgoj, li diris:

– Kara amiko, vi bezonas akompananton, sed ne tian, kiun vi devas gardi dum la noktoj. Kontraŭe, tian, kiu gardos vin de atakoj de bestoj kaj de malbonaj homoj. La solecaj vojoj en arbaroj kaj montaroj povas esti danĝeraj.

Mi tuj ekpensis pri lia hundo, sed kuraĝis nenion diri, ĉar mi sciis, ke ankaŭ li bezonas ĝin. Tial estis por mi granda surprizo, kiam sinjoro U Ba-tan mem proponis al mi kumporti lian fidelan gardohundon. Mi estis des pli feliĉa, ĉar mia amiko akceptis prizorgi la kaprion, kiu dum la lastaj tagoj estis por mi grandega ĝeno.

Kun mia nova kunvojaĝanto, kies nomo estis Pluto, mi daŭrigis la vojaĝon.

Ĝi tiel fidele akompanadis min, ke eĉ ne estis necese ligi ĝin per ŝnuro. Nokte mi trankvile dormis, ĉar mi sciis ke ĝi avertos min se iu danĝero alproksimiĝus. Neniam antaŭe mi sentis min tiel sekura.

Almenaŭ tiel mi pensis en a la komenco, dum ni vojaĝis en solecaj lokoj.

Sed poste, alveninte al pli loĝataj regionoj, ni ofte renkontis aliajn vojaĝantojn. Tiam Pluto kredis sia devo postkuri ĉiujn, boji al ĉiuj, kaj se eble, mordi kiun ajn ĝi atingas.

Pluraj homoj kverelis kontraŭ min pro tio. Unu el ili eĉ volis min bati per sia bastono, kaj alia devigis min pagi grandan sumon ĉar mia hundo mordis lian ĉevalon.

Tiaj incidentoj fariĝis tre oftaj. Mi sentis min respondeca pro la maltrankvileco sur la vojo. Pluto fariĝis al mi ĝena.

Pri tio mi parolis kun Hju Ĉeng-li, la vendisto en kies butikon mi eniris por aĉeti manĝaĵon.

– Kompreneble, – li diris – vi povas havi ankoraŭ eĉ pli grandajn malfacilaĵojn pro tiu hundo. Mi tre rekomendas al vi kunporti pli trankvilan kunvojaĝanton, kiu ne kaŭzos al vi ĝenojn kaj zorgojn.

– Tre volonte, amiko, sed mi ne havas alian kamaradon krom tiu ĉi hundaĉo ...

Dum mi tion diris, el sub iu meblo eliris belega kato. Blanka kun brunaj makuloj. Ĝi venis rekte al mi, kaj ekfrotis sian dorson kontraŭ mian kruron, ameme ronronante.

– Ekzemple se vi havus ameman katon kiel tiu ĉi, vi certe multe pli ĝuus la vojaĝadon, – diris Hju Ĉeng-li.

– Ho, volonte mi posedus ĝin, – mi ekkriis.



– Nu, mi devas demandi mian filineton Sun Ŝiao-pin. Se ŝi konsentas ...

La knabino Sun Ŝiao-pin venis, kaj vidinte mian entuziasmon, ŝi diris:

– Se la kato deziras, mi volonte lasos ke ĝi akompanu vin.

Mi ekkaresis la katon, kaj ĝi ne plu volis disiĝi de mi.

Kiam ni du troviĝis sur la vojo, denove ĉio ŝajnis bela kaj agrabla. Mia nova akompananto kuraĝe trotis apud mi. De tempo al tempo ĝi ĵetis al mi rigardon, kaj amike ekmiaŭis, kvazaŭ ĝi volus diri: "Kiel bela estas la vivo!" Mi tute konsentis kun mia kamarado.

Iun vesperon ni haltis apud vilaĝo. Mia kunvojaĝanto verŝajne deziris amikiĝi kun la katoj de la vilaĝo. Dum mi ekkuŝis, ĝi elŝtelis sin tra la fenestro.

Dum la tuta nokto mi aŭdis aron da katoj vetkuradi sur la najbaraj tegmentoj.

Matene mi longe devis serĉi mian kateton antaŭ ol mi trovis ĝin. Ĝi pardonpetis pro sia ekskurso per amema rononado kaj frotado de sia dorso kontraŭ mian kruron.

Sed ni ne povis ekmarŝi, ĉar mia kateto estis laca de la nokta vagado, kaj nun bezonis ripozon. Nur ĉirkaŭ tagnezo ni povis ekvojaĝi.

Vespere ni denove alvenis al vilaĝo. Kiam mia kateto ekvidis aliajn katojn, ĝi tuj, eĉ sen peto de permeso, aliĝis al la grupo, kaj ekpetolis kun ili. Matene mi eĉ ne klopodis ekmarŝi, ĉar mi sciis, ke la kateto bezonis ripozon. Tio komencis ripetigi ĉiun tagon. Mi ne plu povis profiti la matenajn horojn, kiam la vojaĝado estas plej agrabla. La situacio komencis ĝeni min ĉiam pli kaj pli.

Alvenis al mi la ideo forlasi la kateton, kaj daŭrigi la vojaĝon sola. Sed mi jam tiel alkiutimiĝis havi kunulon, ke mi ne povis forlasi ĝin. Krome mi timis, ke la bela blanka kateto fariĝos malgaja se mi forlasos ĝin.

Iun tagon mi sidis antaŭ la domo de mia nova amiko sinjoro Iĉiro-san, dum la kateto kuŝis ripozante. Junulo nomata Kjoŝi-san alvenis portante en la mano kaĝeton, laŭŝajne malplenan.

– Ne, ĝi ne estas malplena, – li diris. – Ĉu vi ne vidas en ĝi Sateliton?

– Ĉu Sateliton? Ne, tion mi certe ne vidas. Mi nur vidas etan grizan muson en la kaĝo.

– Jes, kompreneble, ĝi ja estas muso. Sed ĝi estas tiel ĉarma, tiel bela, tiel saĝa, ke mi donis al ĝi la nomon Satelito.

– Ho vere, kiel ĉarma ĝi estas!

Dum mi tion diris, mi pensis, kiel bone estus havi tian kunvojaĝanton kiel Satelito. Mi portus ĝin en-la kaĝo, kaj ĝi ne povus forkuri kiel la kato faras.

– Diru, Kjoŝi-san, ĉu vi volus al mi vendi Sateliton?

– Ho, sinjoro, se ĝi plaĉas al vi, mi volonte ĝin donacos al vi.

– Sed...

– Ne, ne, nenion pagu, sinjoro. Se vi volas doni interŝanĝe vian belan katon, mi volonte akceptos ĝin. Estu certa, ke mi bone prizorgos ĝin.

Kun vera ĝojo mi lasis en la manoj de Kjoŝi-san la katon, kaj daŭrigis la vojaĝon kun la bela griza museto Satelito en la kaĝo.

Vojaĝi kun Satelito estis tre agrable. Dum la tagoj mi marŝadis, kaj dum nokto trankvile dormis. Satelito sen protesto obeis al mia programo. Ĝi ja povis ripozi ankaŭ dum la vojaĝado, ĉar mi portis ĝin en la kaĝo.



Ĝi estis vere ĉarma besteto. Multaj homoj kiuj vidis ĝin, montris grandan admiron al mia nova kunvojaĝanto. Ni tiel bone amikiĝis, ke mi pensis, ke mi ne ŝanĝus ĝin por io ajn en la mondo.

Nur unu ideo ĝenis min: tiel bonan amikon mi tenas en kaĝo, kvazaŭ iun malliberulon. Ĉu ne estus multe pli bele, se mia amiko povus troti apud mi, kiel vera kunvojaĝanto?

Iun tagon mi decidis liberigi ĝin. Sed, mi pensis, estas danĝere subite doni al ĝi plenan liberecon. Eble ĝi forkurus. Tial mi decidis, la unuan tagon lasi ĝin eliri nur kelkajn paŝojn el la kaĝo. La duan tagon iom pli, kaj tiel, ĝis fine ĝi alkutimiĝos al tute libera promenado.

Tiel mi faris. Mi bone klarigis al Satelito, ke ĝi ne iru malproksimen, sed nur kelkajn paŝojn ekster la kaĝeto.

Kiam al mi ŝajnis ke ĝi ĉion bone komprenis, mi malfermis la pordeton de la kaĝo. En tiu momento okazis io, kion mi tute ne atendis. Satelito elkuris tiel rapide, ke apenaŭ mi povis vidi ĝin. Post momento ĝi jam estis ĉe la bordo de arbaro.

Kiam la unua surprizo pasis, mi decidis, ke mi ne volas perdi mian bonan kamaradon, kiun mi akiris post tiom longa serĉado. Mi faros kion ajn por kapti ĝin denove. Do mi ekkuris post Sateliton.



Ĝi eniris en la arbaron, kaj mi post ĝin. Kun malfacilaĵo mi kuris inter la arboj, sed mi neniam perdis el la vido la malgrandan grizan museton.

Nun ĝi kuris al monto supren, kaj mi spiregante sekvis ĝin. Kiam ĝi alvenis al la montsupro, ĝi ekkuris al la valo. Same faris mi.

Subite mi ekvidis, ke en la fundo de la valo fluas larĝa rivero. Tiam mi pensis: tie, ĉe la riverbordo Satelito devos halti, kaj mi facile kaptos ĝin.

Sed mi eraris. Satelito sin ĵetis en la riveron kaj eknagiis. Mi hezitis momenton antaŭ la akvo, kiu al mi ŝajnis malvarma, sed fine ankaŭ mi saltis en la riveron kaj komencis nagi. Malproksime antaŭ mi estis videbla la eta kapo de Satelito, elstaranta el la akvo.

Kiam la museto alvenis al la bordo de la rivero, ĝi deskuis de si la akvon, kaj denove ekkuris. Post nelonge ankaŭ mi atingis la bordon, kaj povis ĝin postkuri.

Jen ni kuris monton supren, kaj denove malsupren al la valo. Poste tra herbejo, kaj tra arbaro denove. Mi pli kaj pli alproksimiĝis al mia amiko. Ankoraŭ kelkaj paŝoj kaj mi certe kaptos ĝin!

Sed ĝuste tiam ni alvenis al la landlimo. Tie staris limogardisto kaj doganisto. Satelito trakuris inter iliaj kruroj tiel rapide, ke ili eĉ ne rimarkis ĝin. Sed kiam mi volis preterpasi, unu el ili levis sian manon:

- Haltu!
- Sed pardonu sinjoro, mi ne havas tempon, ĉar Satelito forkuros, kaj mi perdos ĝin.
- Ne parolu stultaĵojn, sed respondu al miaj demandoj.
- Sed sinjoro, nenian demandon mi aŭdis.
- Ĉu vi havas pasporton?
- Jes mi havas, sed rapide ...
- Ĉu vi havas la necesajn vizojn?
- Jes.
- Kaj ĉu ankaŭ devizojn?
- Jes mi havas.
- Montru al mi viajn paperojn.

Mi montris al li ĉion, kaj li sur ĉiun paperon metis kelkajn stampojn, grandajn kaj malgrandajn, rektajn kaj rondajn, laŭ la leĝoj kaj ordonoj kaj la bonaj kaj malbonaj kutimoj de la granda familio de limgardistoj kaj doganistoj.

Fine li redonis al mi ĉiujn paperojn, kaj afable salutis min.

En la sama momento mi ekkuregis. Ĉar satelito estis jam tiel malproksime, ke ĝi jam estis nevidebla. Nur ĝian voston iomete mi ankoraŭ vidis.

Ne lasante ĝin el la vido, mi grimpis grandajn montojn, descendis en valojn, naĝis trans riveron. La distanco inter Satelito kaj mi fariĝis pli kaj pli malgranda. Fine nur kelkaj paŝoj nin dividis. Se mi farus grandan salton, mi eĉ povus ĝin atingi kaj kapti.

Sed denove homo kun uniformo levis sian manon:

– Haltu! Ĉi tie estas landlimo ... Ĉu vi havas pasporton? ... Ĉu vi havas vizon? ...Ĉu ankaŭ devizojn? ... Montru viajn paperojn!

Rondaj kaj longaj stampoj plenigadis miajn paperojn.

Kaj tuj mi daŭrigis la kuradon. En la granda dezerto mi vidis Sateliton salteti ie tre malproksime de mi. Sed mi kuris kaj kuregis, kiel rapide mi povis, kaj la distanco malgrandiĝis ... Ho ve, ĝis la proksima landlimo. Ĉar tie ĉiufoje denove mi aŭdis la samajn demandojn, kaj devis doni la samajn respondojn, kiujn vi jam bone konas.

Fine, post longa kurado ni alvenis al tiu ĉi urbo. Mi bone vidis, kiam Satelito kuris sur unu el ĝiaj atratoj. Tiam subite mi ne plu vidis ĝin. Mi estas certa ke la museto eniris en iun domon de via urbo, por tie sin kaŝi de mi.

Kaj vere mi neniam plu povos retrovi mian bonan kamaradon, krom se vi ĉiuj helpos min. Ĉar eble la museto sin kaŝis ĝuste en via hejmo.

Rigardu bone, mi petas, en via hejmo, sub la lito kaj sub la ŝranko. Ankaŭ malantaŭ la forno, kaj en la angulo malantaŭ la malnova kofro. Eble ie vi malkovros mian karan Sateliton, kaj povos anonci al mi kie ĝi troviĝas.

Kaj vi tute facile povos rekoni Sateliton inter ĉiuj aliaj musoj. Jen kiel:

Ĉiuj musoj estas helgrizaj dum tago. Mia Satelito, tute kontraŭe, estas malhelgriza dum nokto.

Ĉiuj musoj havas la kapon sur la antaŭa flanko kaj la voston malantaŭe. Ili komenciĝas per la kapo. Kontraŭe, mia Satelito komenciĝas malantaŭe, ĉe la vosto, kaj finiĝas antaŭe, per eta pinta kapo.

Nur ĝiaj oreloj estas tute egalaj, kiel ĉe ĉiuj aliaj musetoj: malgrandaj kaj tre scivolemaj.

Fino.